


HAKIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORO:
S-RO. MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

N.º 102
Sep. - Okt. 1976

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 416 44 92 - BILBAO-5



"DON QUIJOTE": Eldonenda verko.

LA estraro informas

Konkludoj de la estrarkunsido okazinta la 7an de aŭgusto de 1976.

a) Informo de l' prezidanto pri la ĵus okazinta hispana kongreso.- La prezidanto, ĉeestinta la nacia kongreson en Ferrol, parolis pri la ĝenerala estos kaj -ĉefaj- konkludoj, kaj pri la partopreninta junularo, aliflanke. Laŭ nombro, ĝi estis simila al tiuj de la lastaj jaroj, escepte de la pasintjara en Lerida. Kiel ĉefan atingon oni devas rimarki la baldaŭan finan pagon de la HEF-sidejo en Madrid. Tio, ni esperas, liberigos HEF-estraron por la entreprenado de novaj iniciatoj.

Rilate la junularon, ĝi ne estis multnombra, kiel ĉiam dum la lastaj jaroj. Pri tio -ĉefe- kulpas HEJS, kiu ne aktivis en varbado por la kongreso, kaj ne pretigis specialajn apartajn programerojn por la junularo. Tamen, kompreneble, ni ĉiam devas favori la IJK-on en kazo de koincido. Sursipa HEJS-kunsido okazis dum la kongreso. Dum ĝi, la prezidanto klarigis al novuloj la strukturon de la E-movado, kaj la rolon de HEJS ene de ĝi. Laŭ konsento de la estraro, nova delegito en Ferrol estas "Angeles Nuñez".

b) Studo de la ĝismuna sekretaria laboro en la nuna jaro.- Dum la lastaj monatoj, la sekretaria laboro ne tute bone disvolviĝis. La leterarĥivo ne estis bone utiligita, kaj la ricevataj alilandaj bultenoj ne estis konvene ordigitaj. Do, oni faros la eblojn, por ke tio de nun ne plu okazu.

c) Novaj komentoj pri la eblecoj de venontjara pluekzisto de HEJS en nova sidejo.- Fakte, en tiu ĉi problemo, nenia nova solvo estis al ni proponita, kaj la afero restas same, ĉar la nuna prezidanto ne ŝanĝis sian decidon demisii fine de ĉi jaro.

Sed oni devas aldoni plian "komplikaĵon": pro kaŭzoj, kies klarigo tie ĉi estas superflua, ekzistas la tre probabla ebleco, ke la Bilbao'a Grupo perdos sian sidejon, eble eĉ dum la nuna jaro. Ĉar tiu estas samtempe la HEJS-sidejo, povos okazi ke HEJS PERDOS SIAN SIDEJON. En tiu kazo, malgraŭ tio, ke la jaro ankoraŭ ne finiĝis, la nova teamo devus jam fakte, se ne oficiale, entrepreni la gvidadon de HEJS. Tio, kio estas klara, estas, ke venontjare HEJS-sidejo ne povos troviĝi en Bilbao, ne pro la estrara demisio nur, sed ankaŭ pro la materiala neekzisto de la sidejo.

ĉ) Dankesprimoj al f-ino Inés Gastón pro ŝia kunlaboro en la pretigado de la 100a numero.- F-ino Inés Gastón senrezerve kaj sindone helpis en la korektado, presado, ktp. de nia 100a numero, kiun kvankam malfrue, la membroj ricevis kune kun la jam preta 101-a. Ankaŭ HEF-anoj ricevis ĝin kun "Boletín".

La estraro decidis fari al f-ino Gastón malgrandan simolan donacon, kaj la prezidanto sendos al ŝi dankleteron.

d) Pristudo de la ebleco subvencii "Fundacion Esperanto" por helpi eldonon "esperantlingvan" de "Don Quijote".- La intenco de la estraro estas vekii la atenton por la publikigo de l' jam preta esperanta traduko de "Don Quijote". Por tio, ni iniciatos ene de "Fundacion Esperanto" specialan tiucelan konton, (2.000 ptoj).


e) Pliaj sugestoj kaj proponoj.- Ne ekzistas novaj proponoj.

La estraro

Dankon!

Jes ni devas danki fraŭlinon Inés Gastón pro ŝia helpo en la presado de la "101-a" numero, same kiel ni ankaŭ devas danki al HEF, kiu konsentis disdoni, kune kun Boletín, nian jubilean numeron.

EDUKA SISTEMO EN HISPANIO



NUNA STRUKTURO

La ĉi apuda skemo prezentas la diversajn eblecojn, kiujn havas en nia lando, persono ĵus fininta la instruperiodon de la ĝenerala baza edukado (EGB), kiu volas daŭrigi la studadon ĝis atingo de ia diplomeco. Do, por ke la tuta skemo estu bone komprenata, jen la sufiĉaj klarigoj :

- EGB: ĝenerala baza edukado
- BUP: supera (abiturienta) kurso -bachillerato-
- COU: kurso de universitata orientado
- A : fakultatoj kaj superaj teknikaj lernejoj
- B : universitataj lernejoj
- C,D: kompletiga instruado
- FP : profesia formado
- O : kurso de adaptiĝo
- : ekzameno por eniro aŭ transiro
- * : diplomeco (diversaj gradoj)
- : ireblaj vojoj

Ĉiu (homo) havas rajton je edukado. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝinta naciaro (UN) por konservo de paco.

Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

(26-a artikolo de la Universala deklaro de homaj rajtoj)



Eltombigita artikolo

Ĉi artikolo kiun ni prezentas al vi, troviĝis kaŝita inter multaj aliaj paperoj; forgesita de aliaj HEJS-redaktoroj, kiuj eble taksis ĝin nekonsvena.

La artikolo komencas per la vorto "Denove", kio estas vere stranga, ĉar ĝi volas klarigi ke la subskribinto "ARTUR", jam antaŭe skribis por HEJS, kaj ni, almenaŭ ene de la dua periodo, trovis neniun artikolon aperintan sub tiu subskribo. Ĉu la kunlaboro estis eble pli frua? Ha, mi forgesis diri ke la originala titolo de la artikolo estas: "Por pensigi vin".

Denove mi estas kun vi por rakonti ion, kio eble plaĉos al vi aŭ ne, sed ĉiam estas kurioze por ni eŭropanoj... kun eŭropaj kutimoj.

Ŝajnas al mi ke ja mi neniam parolis pri la manĝoj en Saharujo (a), kutimoj, manieroj kaj ... superstiĉoj pri tio, ĉar, kiel mi jam diris la saharanoj estas tre religiemaj.

La saharaj homoj ne manĝas same kiel ni, la hispanoj; ili ĉiam trinkas multe da teo, dudek tasojn aŭ pli ĉiutage; kaj tiu ĉi trinkaĵo malpliigas la apetiton. Ĉi tie ekzistas la "bona" kutimo kiu donas al la patro (familiestro) la rajton manĝi unue; poste, kiam li jam finis, manĝas la mastrino, la infanoj kaj... la infaninoj, kaj neniu pli, supozante ke tiu familio ne havas sklavojn, ĉar se tio okazas, ili estas, kiuj laste manĝas, se povas (1).

Eble vi jam scias ke muzulmanoj neniam gustumas porkan viandon, nek alkoholan trinkaĵon, nek kian ajn viandon se ili ne scias kiel estis mortigita la besto (2).

Alia aspekto de tiel ekzotika lando, estas tiu de la virina mondo. La eŭropaninoj, ĉiam pri-

zorgante sian liberigan movadon, ne konas kiel estas la virinoj ĉi tie, kiamaniere ili estas malliberaj en la socio.

Unue, ŝi neniam rajton havas, kaj due neniam devon (socie). La du aferoj estas same malbonaj. Ŝi naskiĝas kaj mortas pasive; tia vivo estas nekomprenebla por ni, se tio estas vivo, ĉar mi opinias ke ŝi vere ne vivas.

Dum la infaneco ŝi ĉiam estas la lasta por ĉio, kaj la plej grava afero de kiu ajn persono en sia vivo, tio, kio estas ami, vere ami, estas ja nekonata por ŝi; ŝi neniam konas ĝin. Ĉi tie oni povas aĉeti edzinon, ĉar se vi volas edziĝi, vi do devas aĉeti ŝin. Estas normale ke maljuna homo, 70 jaraĝa aŭ pli, aĉetas junegan kaj belan fraŭlinon.

Mi supozas, ke vi komprenas kion mi deziras diri al vi, ĉar mi nur volis fari korespondon kun vi; se mi atingis tion, mi ja estas kontenta.

ARTUR (JESS)

a) Temas pri la ekshispana Saharo (Noto de la redakcio).

1) La hispana registaro permesas al iu ajn (saharanoj) havi sklavojn en Saharujo. La sklavoj estas negroj kaptitaj en la suda parto de la lando. Ĉi tiu kutimo estas la plej elradikigita, sed ne tute, ĉar mi ankoraŭ povis koni sklavojn ĉi tie kie mi estas.

2) "Muzulmanoj" havas la kutimon mortigi la bestojn rigardigante ilin al oriento; tio estas aktuale tradicio iom malaperinta, sed nur iom.

Pro
ver
boj.

Kiu volas mensogi, devas bone memori.

Ilo ne devas fariĝi celo.

Nigro sur blanko pruvas sen manko.

Kiu venas plej frue, sidas plej ĝue.

Barelo malplena sonas plej laŭte.

POST KIAM



Eble vi rimarkis en nia 100-a numero, ĉe la traduko far F. de Diego de la rakonto "Perdita vizaĝo" (J. London), la apero de la formo "POST OL", kiun li utiligas anstataŭ "POST KIAM". Ankaŭ ni, legante la manuskripton, kiun sendis al nia redaktejo la tradukinto, faris tiun rimarkon. Do, ni rapidis skribi al sinjoro de Diego por iel-iome pri-esplori la aferon. Dum la atendo de lia respondo, ni tralegis la librojn, "La arbo de la sciado" (Pio Baroja) kaj "Doña Barbara" (Romulo Gallegos), tradukitajn de li mem; kaj ni konstatis ke li, sekvan-te ĉiam la saman kriterion, utiligas la esprimon "POST OL". Nu, jen lia respondo (klarigo) al nia letero:

-Kvankam la ĝenerala kaj tradicia formo estas post kiam, mi preferas post ol, unue, ĉar ĝi analogas al la formo antaŭ ol; due, ĉar ĝi pli bone prononceblas ol post kiam, kie dure karambolas la konsonantoj to kaj ko; kaj trie, ĉar ĝi estas dusilaba, ne trisilaba kiel post kiam, atentinda avantaĝo kiam oni versas!

-En Plena Gramatiko, II-a volumo, 3-a eldono, paĝo 325 oni legas:

"La subjunkcio de la antaŭtempa tempo-pro-o estas post kiam aŭ post ol. La lasta formo estas multe pli oportuna, kvankam apenaŭ uzata ĝis nun. Zamenhof, konsultita de Boirac pri ĉi tiu formo, ĝin plene aprobis. (oficiala gazeto, 1914, paĝo 156)

Tuj post ol ni konsultis ĉiujn la fontojn menciitajn de sinjoro de Diego, ni konvinkiĝis pri la praveco de nia kara akademiano, kaj... de nun ne tro miru se vi trovas la formon "POST OL" en la skribaĵoj de tiu ĉi modesta redaktoro.



POST OL

- "Olimpikaj ludoj" -

La olimpika komitato (COI), rifuzis uzi oficiale la kastilian lingvon, ene de la olimpikoj.

La plenumkomitato de tiu ĉi organizo, tamen, decidis akcepti ke la aktoj de la kunvenoj kaj kongresoj estu tradukotaj ankaŭ en la kastilian.

Multnombra aro de kastili-parolantaj landoj, petis al COI rekoni la kastilian kiel oficialan lingvon, pretekste ke, la nombro de partoprenantaj nacioj, en tiaspecaj sportaj eventoj, kiuj uzas ĉi lingvon, estas tre granda.

(..kaj ni povas aldoni ke la nombro de kastililingvanoj, partoprenintaj la Olimpikoj, estas multe pli granda ol tiu de l'franclingvanoj, kies lingvo, malgraŭ tio, estas oficiala.)

HELPU ANKAŬ VI !!

HEJS ĵus malfermis specialan konton ene de la "Fundación Esperanto" (Maria Moreno 35 - 4drch. Zaragoza) kun la celo instigi la hispanajn esperantistojn al mona kunlaboro kun la Federacio pere de tiu, ĝia faka organo, kaj de la mer-ciita konto, partikulare, en tiu klopodo eldoni la plej faman hispanan verkon:


"DON QUIJOTE"

La kvanto per kiu HEJS malfermas ĉi konton estas ja malgranda, 2000 ptoj, sed konforma al la eblecoj de la sekcio.

Ni esperas ĉies helpon!



La golulo klopodas eviti ke la pilko transpasu la golan linion (pardon de la golejo). Li estas la ununura en la teamo, kiu rajtas tuŝi aŭ kapti la pilkon per la manoj.




La golulo PARATAS la pilkon

La avanulo ŜOTAS



La avanulo apartenas al la atakanta linio. Li devas klopodi pafi la pilkon en la golejon kontraŭan per ŝoto, kappuŝo, ktp.





Tiu ĉi halfo KIKAS bone

La tasko de la HALFO estas ALPUŜI la pilkon al la avanulo por ke tiu ŝotu, kiam eblas, al la kontraŭa golejo

ELPILKO : trapaso de la flanklinio far la pilko.

ALPUŜO : transdono de la pilko al ano de la sama TEAMO per ebena puŝo.

KIKI : antaŭenpuŝi la pilkon (aŭ ion ajn) per la piedo. (Ĉi vorto kune kun PARATI ne troviĝas en PIV, sed en ISAE-TC)

ŜOTI : KIKI pafe la pilkon.

(1) ĉemizo. (2) ŝorto. (3) ŝtrumpo.

(4) boto. La golulo kutime uzas ĵerzon.



FINTO: ŝajniga atako (ekiro) por trompi la kontraŭulon kaj preterpasi lin.

DRIBLI: preterpasi kontraŭulon post finti lin.

FAŬLO: malregulaĵo kiu konsistas, preskaŭ ĉiam, en la provo de stumbligo de unu ludanto far iu kontraŭulo.

La ludanto A FAŬLAS la ludanton B.



Deziras korespondi

En Hungario volas Korespondi:

Kalmán Szeberes (21)
1115 Budapest
Helefoldi U. 18 FSRT 11

Bozo Erika (17 jaroj)
2633 Pécs
39-es Dandanw 2/C

Teresa Ditrich (22)
7754 Bozy
Damjanich U. 10

J. Rajkai Istuan (19)
H-1156 Budapest XV
Hevesi Gyula Ut 60.3.15

Klára Mészáros (21)
1122 Budapest
Maras U. 34 F.4

Kis Erika (18)
3246 Matraderescke
Deak Ferenc Ut 2

Rondo "Ĉe la maro" volas kontakti kun aliaj personoj aŭ grupoj. Ĝin precipe interesiĝas la interŝanĝo de Esperantaj libroj, Esperantaj gramofondiskoj, naciaj pupoj, E-aj kaj naciaj flagetoj. Eblas organizi sendevizan interŝanĝon de grupoj junularaj turisme. La adreso estas:

Koło nr 8 "Ĉe la maro"
80-389 GDANSK ul Ślęska 66B
Dom Spoleczny (Pollando)

Japana Esperanto-Instituto peras la internacian korespondadon en Japanio. Do, tiu, kiu volas korespondi kun japanaj esperantistoj, klare kaj preslittere, skribu leteron al jena adreso: (napre indiku la aĝon, sekson, intereson kaj profesion)

Koresponda servo de Japana E-Instituto
Hongo 2-2-14 Bunkyo-ku
Tokio 113 (Japanio)

atentu!

La nova dato por la sendo de solvoĵoj de la krucvorteniĝoj, aperintaj en la 100-a kaj 101-a numeroj, estas la 30-a de novembro. Do, rapidu! atendas vin tre interesaj premioj.



Estis foje ĉapo verda,
bona knabo, multe lerta,
diligenta novlernanto
de la lingvo Esperanto.

Dum li iras al la grupo
renkontiĝas kun la lupu,
deĵoranto sub servuto
de la Brita instituto,
por la svingo kaj la lek'
de la flago Union Jack!
kun oksforda tono diras
la lupeg': "Vi kien iras?"

"Al la kurs' konversacia
de la lingv' internacia,
kaj neŭtrala kaj facila,
por la tuta mond' utila!"

- tuj respondas ĉapuleto
kun en man' verda libreto;
kaj, ĝentile salutante,
al la kiub' ekiras lante.

Sed la lupu pli rapide
ĝin atingas kaj perfide
ruze trompas l' instruiston,
kiu perdas la ekziston

verda ĉapo

formanĝita unuglute
de la lupu, kiu tute
tuj kamuflas sin simile,
kaj atendas tre trankvile.

Tok! Tok! venas Ĉapo frape,
kaj li haltas mire, gape ...
"Kiel grandaj la okuloj!"
"Por kontrolo de l' reguloj."

- diras lupu sen ŝanceloj.
"Kiel grandaj la oreloj!"
- Verda ĉap' insisti provas.
"Tiel aŭdi bone povas

mi pri kaz' akuzativa."
Verda Ĉapo plu naiva:
"Kial estas buŝ' enorma,
kiel granda pordo forna?"

"Por vin manĝi ja pli bone!"
kaj la lupu, senpardone,
salte kaptas Verdian Ĉapon,
manĝas korpon, manĝas kapon,

lin englutas dumminute,
lin kruele voras tute,
ŝiras, maĉas lin kun krako
ĝis pleniĝo de l' stomako.

Kaj post tiu entrepreno,
la lupeg', sen ia ĝeno,
vivis longe dumjarcente,
tre feliĉe kaj kontente. **Fino**

Dall'
Acqua
Molle

EN NOMO DE LA ĈIELO, KIU AJN VI ESTAS, IĜU VIDEBLA VIV!

MI ESTAS ĈI TIE!

KIE? KIE ESTAS ĈI TIE?

TIO ESTAS KION MI VOLAS SCII!

MI ESTAS PERDITA! FROSTIGITA KAJ MALSATA!

ĈU ESTAS VI NEVIDEBLA?

NE! VI POVAS VIDI MIN! KIALVI NE HELPAS MIN?

MI NE REZISTAS PLU! MI REIRO EN LA ĜIPON ANTAŬ OL FRENEZIĜI!

ATENDU! NE FORLASU MIN! MI ESTAS PERDITA! JES! PERDITA!

EL KIE VI DEVENAS?

EL LA KVARA GALAKSIO!

LA GALAKSIO KVARA!

EN TIU DIREKTO... AL VEGO, JE DEK DU LUMJAROT DISTANCE.

VI SAVIS MIN HOMO!

**NUN MI POVAS REIRI
HEJMEN!**



ANKAŬ MI,
AMIKO.

UF! KIAN TRAVI-
VAJON! UNU VOĈO
EL LA NENIECO..!

ANKORAŬ MI
KREDAS AŬDI TIUN
KORTUŠAN TONON..!



ĈU ESTIS ĜI SONGO
AŬ TIU ATMOSFERO
AFEKCIIS MIAN
MENSON...?



MI JAM SCIAS! MAL-
GRAŬ NEKREDEBLA EBLAS
UNU KLARIGO!



IO VIVA ESTIS TIE KUN MI.
KAJ MI VIDIS ĜIN! MI VIDIS..



SED... MI KREDIS
KE ĜI ESTIS NUR
ASTERIDO!

**ADIAŬ
HOMO!**




ĈI RAKONTO ESTAS ELTIRITA EL ELDONAĴOJ "VERTICE"

FINO




3730



OLMCO

Kiu voje ebligos al la
sunradioj atingi la floron?



ALAN BIRRI

10
sekundoj
da
distro

